

Numero: 248.
Januaro: 2013.

21-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espBELA@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Post la mondofino

Tero saviĝis. La mondo ne pereis. Ni vivas kaj laboras plu por nia amata lingvo Esperanto.

Estus malbone, se ĝuste ni geesperantistoj estus kredintaj, ke la mondo pereigās.

Verdire en la mano de la homaro estas iloj per kio ni povus pereigi nian terglobon. Krome ni, homoj estas malbonaj mastroj. Ni ne atentis pri nia medio. Ni malpurigas kampojn, arbarojn, riverojn, marojn, eĉ aeron.

Tio estas malbona kaj ege timiga. Se iam Tero tamen pereos, tio okazos ne pro asterido, sed la homa stulteco. Jam nuntempe ni estus kapablaj deflankigi ĝin, se inter divresaj nacioj estus konsento kaj kompreno.

Do nin evitis la mondofino kaj espereble ankoraŭ ni longe povos vivi pace kaj harmonie sur nia belega planedo.

Ankoraŭ estos sufiĉe multe da tempo por disvastigi Esperanton, kaj alvenos tiu brila tago, kiam ĝi vaste, en ĉiu tavolo estos parolata lingvo.

Vere ofte mi malgajiĝas, kiam mi rigardas la situacion de la zamenhofa lingvo. Junaĝe mi pensis, maljuniĝonte jam ne estos demando, ĉu Esperanto estos la dua gepatra lingvo de la homaro. Intertempe pasis multaj jaroj, jardekoj kaj ankoraŭ daŭras „la milito”, kiu lingvo estu elektita. Por mi tre tre doloras, kiam mi vidas miajn samlandanojn, kiel ili primokas, atakas Esperanton.

Prefere ili lernas grandajn mondlingvojn dirante cinike: kie estas uzata Esperanto? Se mi iras eksterlanden, kie mi povas uzi ĝin por perlabori.


Por la nuna homo ĉio estas la mono. Iliajn okulojn blindigas la mistera lumo de eŭro, dolaro kaj aliaj valoraj valutoj.

Laŭ mi tiu ĉi vidpunkto estas danĝere miopa kaj ĝi ne kondukas al perfekteco. Estus bone, se tiuj ĉi homoj pensus pri la estonto de sia nacio kaj ne lasus pereigi sian lingvon kaj kulturon.

Se nacio perdiĝos, tio estos la vera, tragika mondofino.

Prosperan, sanan, pacan novan jaron por ĉiu leganto de Vesperto.

-Redaktanto-



Babilado

-Kara, pri kio vi pensas?

-Min tre ĝenas, ke mi scias neniun fremdan lingvon. Mi admiras homojn, kiuj perfekte povas komuniki kun eksterlandanoj. Pasintjare mi estis en Germanio kaj mi ne povis komprenigi min en vendejo, kvankam la vendistinoj provadis per kelkaj lingvoj.

-Vi pravus, tio estas ĝena situacio ĉefe eksterlande, se oni ne povas ekparoli. Mi komprenas vian malĝojon.

-Tamen, kion fari?

-Malfacila demando. Mi proponas al vi, lernu lingvojn! Se vi ellernos kelke da fremdaj lingvoj, vi povos komprenigi vin en la tuta mondo. Ĉefe oni devas ellerni la anglan lingvon, ĉar ĝi estas plej disvastiĝinta. Oni parolas kaj uzas ĝin preskaŭ en ĉiu lando. Krome estas necese scii ankaŭ la germanan, francan, rusan lingvojn. Ho, mi preskaŭ forgesiĝis pri la araba kaj ĉina. Lastatempe tiuj ĉi lingvoj tre disvastiĝas.

-Ĉu vi ne forgesiĝis pri la hispana kaj portugala lingvoj? Onidire ilin parolas la tuta Sud-Ameriko kaj tiam mi ne menciis pri Usono, kie en granda procento oni parolas denaske la hispanan.

-Vi tute pravus. Ankaŭ la hispana estas tre grava kaj populara lingvo. Ĝi estas inde ellerni.

-Tiu ĉi nombro de la utilaj lingvoj estas multega. Kiom da vivo sufiĉus ellerni ĉiom. Ĉu ekzistas homo, kiu parolas ĉiun lingvon?

-Jes estas kelkaj lingvogeniuloj, kiuj ellernis almenaŭ dudek aŭ dudek kvin lingvoj.

-Ili estas feliĉuloj, ĉar certe ili ne havas lingvan malfacilaĵon en la mondo. Ĉu ne?

-Eble, sed ne forgesu, ankaŭ ili ne povas ellerni ĉiom. Sur la terglobo ekzistas pli ol tri mil lingvoj. Vere kelkajn parolas nur malmulte da homoj. Inter ili estas lingvoj, kiuj baldaŭe formortos, kaj por ĉiam malaperos.

-Bone, fine restos cent aŭ cent kvindek. Por mi ankaŭ tiu ĉi nombro estas multa. Se mi vivus pli ol mil jarojn ankaŭ tiu ĉi tempo ne estus sufiĉa ĉiom ellerni.

-Jes. Jes. Tio estas la granda problemo de la homaro. Urĝe ni devos trovi la solvon, ĉar ni droniĝas en la maron de la lingvoj.

-Vi diris, la angla estas pleje disvastiĝinta. Do la dua lingvo ĝi estu, kaj en la estonto ni uzu ĝin ĉie.

-Estas problemege. La angla ne estas sendependa kaj kontraŭ ĝi multaj nacioj protestas.

-Ve! Mi ne scias kion fari? Kiu scias la respondon? Ĉu ekzistas ia solvo, kiu helpas al ni en tiu ĉi giganta babela ĥaoso?

-Ŝaŝa-

Saniga kanto

La virino ĉiam kantis. Ŝi kantis, se ŝi malĝojis, se ŝi estis feliĉa.

Ŝia domo estis, kiel arbaro, kie birdoj triladas de mateno ĝis vespero.



La najbaroj admiris ŝian belegan voĉon. Printempe kaj somere kiam la fenestroj estis malfermitaj, ŝia kando inundis la tutan ĝardenon.

Proksime loĝis tre malsana oldulo. Laŭ la kuracisto liaj tagoj jam estas nombritaj. Ne estas helpo. Kiam ajn povas frapeti sur la pordo la Morto.

En iu belega printempa tago la edzino de la malsanulo malfermis la fenestron por aerumi. Kun la freŝa aero ankaŭ la kanto de la virino enpenetris la ĉambron.

-Kiu kantas? – demandis la viro kuŝanta en la lito.

Li apenaŭ spiris. La edzino rigardis lin senespere.

-Ja vi scias, la najbarino. Ŝi ĉiam kantas. Ĉi virino estas kantobirdo.

-Belega muziko – ekĝemis la malsanulo – Invitu ŝin domen. Mi ŝatus vidi ŝian vizagon dum kantado.

Certe ĝi estas lia lasta deziro – pensis la virino kaj ŝi iris al la virino.

-Kantu al mi! – petis la viro, kaj siajn malklarajn okulojn li malfermis.

La kanto plenigis la ĉambron. La melodio disvolviĝis kaj ĉirkaŭis la liton. Subite la maljunulo ekridis kaj liaj okuloj ekbrilis.

Ĉu okazis miraklo? La edzino alkuregis la liton. Ŝi nur balbutis:

-Karulo, vi, vi ŝanĝiĝis. Via vango ruĝa, kiel rozo. La kanto resaniĝis vin. Tuj mi alvokos kuraciston.

La kuracisto ekzamenis la malsanulon kaj li mire konstatis:

-Oĉjo Pista estas tute sana. Kio okazis? Mi ne komprenas – li mallaŭte flustris al la duone ploranta, duone ridetanta edzino – mi pensis, ke ĝis morgaŭ li mortos.

-Sinjoro doktoro, – eksidis la maljunulo en la lito – la kanto resanigis min. La muziko havas miraklan forton.

-Apáti Kovács Béla-



Pri imaga vojaĝo

-Fantasta rakonto-

V.

Mi tre surpriziĝis kaj balbutante diris al la virino.

-Saluton!

-Hodiaŭ vespere la maro estas pitoreska. Ĉu ne? Mi ŝatas la vesperan maron. Tiam la koloro de la naturo ravas min.

-Vi pravas, ĉi vespere la maro estas belega. Sinjorino, ĉu ankaŭ vi apartenas al la grafo Bonfarulo.

-Fraŭlino.

-Ho, pardonu min!

-Ankaŭ mi estas nur gasto sur la ferdeko, kiel vi.

-Interese. Kion li volas de ni?

La virino ekridetis kaj per ŝiaj bluaj okuloj ŝi rigardis malproksimen.

-Ankaŭ mi ne scias. Li estas stranga homo. Efektive neniu scias kiu li estas.

Ili staris senmove ĉe la barilo de la ferdeko. Ili mutiĝis. De ie agrabla muziko aŭdiĝis.

Malrapide la malhelo envolvis la maron kaj la ŝipon. Sur la ĉielo ekaperis la ŝteloj.

Mi eklevis mian vizaĝon kaj mi ekprovis serĉi fiksan punkton sur la horizonto. Ĉio estis mistera kaj neimagebla. Apud mi staris belega, juna virino kaj ankaŭ ŝi ne sciis la celon de nia vojaĝo.

Post iom da tempo ŝi ekparolis:

-Mi malvarmas. Ĉu vi venos kun mi?

Mi volonte sekvis ŝin. Sur la ŝipo mi trovis aliancon.



Ni iris al la manĝejo, kie estis kelkaj maristoj. Ili ekstarante salutis nin.

-Bonan vesperon gesinjoroj.

Mi ĝene akceptis ilian saluton. Ili ĉiuj ĵetis avidan rigardon al mia kunulino. Kelkaj el ili ekfajfis. Ŝajne ŝi ĝuis la popularecon kaj ekridetis.

-Ili estas simpatiaj knaboj – ŝi diris kaj ni sidiĝis al proksima tablo.

Intertempe la maristoj foriris. Ni restis duope en la manĝejo. Unue ni silente sidis ĉe la tablo. Ŝi ekparolis post kelkaj minutoj.

-Onidire la grafo Bonfarulo estas inventinto kaj li havas insulon, kien nun ni veturas per tiu ĉi eleganta ŝipo. Eble morgaŭ antaŭtagmeze ni alvenos. Mi esperas, tiam ni ekscios la celon de nia vojaĝo.

(daŭrigota)

Poezio

Cezar Unue la devoj

(morala poemo)

Unue la devoj
kaj nur due la revoj.
Unue la ŝvito,
kaj nur poste merito.

Unue la mono
kaj nur poste sindono.
Unue sekuro,
kaj post tio plezuro.

Unue la hasto
kaj nur due prokrasto.
Unue amoro
kaj nur poste la koro.

Unue la sporto
kaj post tio la torto.
Unue la rango
kaj nur poste la tango.

Unue do peno
kaj postpene la beno.
Unue do faroj
kaj nur poste mevmaroj.

Unue la unua
kaj post tio la dua.
La duan do due...

Ĉu do ĉion tro malfrue?



Poezio

Cezar Amoru, sed...



Fiku, fiku, sed indiku
ne taglibre tion stulte.
La putinojn ĉiujn fiku,
kaj edzinojn eĉ adulte.

Fiku, fiku, sed sen listo.
Do, ne notu ĝin fervore.
Se ĝin kaptos ĵurnalisto,
li publikos ĝin senkore.

Fiku, fiku, sed sekrete.
Do fikaĉu plu kun plaĉo,
sed priskribu ĝin ne rete,
tuj vi sidus en la kaĉo.

Fiku, fiku, voluptulo,
sed ne babilaĉu multe.
Agu laŭ ruzulpostulo,
do ne fanfaronu stulte.



Por infanoj

Peĉjo lernas Esperanton

-Avo, kio estas Esperanto? – demandis Peĉjo la avon.

-Ĝi estas lingvo – respondis la maljunulo. – De kiu vi aŭdis pri ĝi.

-Sur la strato de onklino. Ĉu ĝi estas lingvo, kiel la hungara.

-Jes, kara nepeto mia.

-En kiu lando oni parolas Esperanton?

-Esperanto estas parolata en ĉiu lando sur la tuta terglobo. Ĝi estas internacia lingvo.

-Ĉu oni parolas ĝin ankaŭ en Anglio?

-Kompreneble. Mi havas amikon en Londono kun kiu mi korespondas en tiu ĉi lingvo.

-Avĉjo, ĉu vi scias Esperanton? Kial vi ne diris tion ĝis nun al mi?

-Ĉar vi estis tro malgranda knabeto. Mi pensis, kiam vi pliaĝiĝos mi rakontos al vi pri tiu ĉi lingvo.

-Mi petas vin, kara avĉjo, parolu pri Esperanto al mi. Ĝi tre interesas min.

-Bone kara mia – diris la avo. – Atentu! Esperanto estas artefarita lingvo. Ĝin kreis pola onklo nomita Ludoviko Lazaro Zamenhof, ĉar li sentis la neceson de helplingvo per kiu oni povus komuniki ĉie en la tuta mondo. Li kreis tian lingvon, kiu ĉiu facile kaj rapide povas ellerni. Krome estis grava vidpunkto, ke ĉi lingvo estu neŭtrala, sendependa de ĉiu kulturo kaj popolo.

-Ĉu ankaŭ mi povus ellerni ĝin?

-Kial ne? Mi helpos al vi en la lernado, se vi deziras.

-Tio estus tre bona. Ankaŭ mi volas korespondi per ĝi kun eksterlandaj geknaboj. Ĉu vi helpos trovi al mi ankaŭ korespondamikon?

-Tre volonte. Sur la interreto estas multaj Esperanto-paĝoj, kie vi trovos korespondpetojn. Sed se vi deziras, mi petas mian Londonan amikon, ke li serĉu por vi korespondamikon.

La knabeto estis tre kontenta kaj li tuj volis skribi leteron en Esperanto, sed lia avo diris al li:

-Unue vi devos lerni la lingvon, nur poste vi povos korespondi.

-Mi nun tuj deziras lerni Esperanton – li diris. – El kiu lernolibro ni lernos?

-Mi serĉos mian malnovan lernolibron, kaj ni lernos el ĝi. Ĉu bone?

-Bonege – eksaltis la knabeto kaj li ekiris kun sia avo serĉi la lernolibron.

Gi jam delonge ne estis uzita kaj tial la avo kaŝis ĝin profunde inter la librojn.

Ili longe serĉis la libron, ĝis fine ĝi estis trovita. Vere ĝi estis malnova kaj iom kaduka. La avo blovis la polvon de sur ĝi kaj diris:

-Jen mia unua Esperanto lernolibro kara mia. El ĝi mi lernis tiun ĉi lingvon antaŭ multaj, multaj jaroj. Nun ĝin mi transdonas al vi por ke povu ellerni la zamenhofan lingvon.

Peĉjo atentis, rigardis kaj fuliumis la malnovan lernolibron. Kompreneble unue li komprenis preskaŭ nenion el ĝi. Verdire li tuj ekvidis kelkajn konatajn vortojn kaj li feliĉe ekkriis:

-Avĉjo, ja tiuj ĉi vortoj: ŝoforo, ĉokolado, elefanto, vazo similas al la niaj. Ankaŭ en mia gepatra lingvo oni eldiras ilin preskaŭ tiel.

-Karulo, vi bone vidas, la vorttrezoro de Esperanto estas internacia. Dum la lernado vi renkontos multe da konataj vortoj. La gramatiko de la lingvo estas simpla.

Ekde tiu ĉi tago Peĉjo diligente lernis Esperanton per la helpo de sia avo.

La knabeto ĝuis la lernadon. Ankaŭ la maljunulon surprizis kiom rapide lernas la zamenhofan lingvon sia nepeto.

La tagoj kaj semajnoj pasis unu post la alia. En iu tago la knabeto diris al la avo:

-Avo, mi petas vin, helpu trovi al mi korespondamikon, ĉar mi deziras korespondi kun eksterlandaj knaboj aŭ knabinoj per la helpo de Esperanto. Laŭ mi, mia lingvoscio estas perfekta por korespondi. Ĉu ne?

-Efektive vi jam scias multe en tiu ĉi lingvo. Hieraŭ ni tute bone babiladis. Baldaŭe vi scios pli bone ol mi. Por mi estas grandega ĝojo, ke mia nepeto ellernis tiun ĉi belegan kaj utilan lingvon. Mi esperas, kiam vi plenaĝiĝos, ankaŭ tiam vi restos entuziasma esperantisto – diris la avo. – Jes kompreneble mi helpas trovi al vi korespondamikon. Ŝaltu la komputilon kaj mi montros al vi retpaĝojn, kie vi trovos la adresojn de eksterlandaj geesperantistoj.

Sur la retpaĝo estis multe da adresoj kaj Peĉjo apenaŭ povis elekti. Fine li trovis polan knabinon, kiu loĝis en Krakovo.

Iom ekscitite li komencis skribi sian unuan leteron en Esperanto. Dume lia avo kontente rigardis sian nepon kaj li rememoris, antaŭ multaj jaroj ankaŭ li tiel faris la unuajn paŝojn al Esperanto Movado.

-Onklo Adalberto –



Vintraj bildoj



Vintraj bildoj

